# *Ni ebligu niajn revojn, e? la neeblaj, asertis la kuba prezidento*



**La prezidento Miguel Díaz-Canel dum fermparolado en la parlamento**

Havano, dec 23 (RHK) En ?eesto de la armea generalo Raúl Castro Ruz, gvidanto de la Revolucio, la prezidento, Miguel Díaz-Canel, invitis ?i-vendredon igi la revojn venki la politikon de persekutado kaj la sie?o trudita de Usono kontra? la insulo,  e? tiuj neeblaj.

En firma parolado anta? la pli ol 400 deputitoj, kiuj konsistigas la Nacian Asembleon de Popola Povo (Parlamento), en la Dua Ordinara Periodo de Sesioj, la prezidento atentigis, ke la 1-an de januaro la nacio festos la 65-an datrevenon de la triumfo de la Revolucio kaj ?i faros tion kun ?ojo, kiun e? la plej malbonaj ventegoj de la naturo a? la (nordamerika) imperio ne povis forpreni.

Ni festos nian volon pri tio, kio devas esti ?an?ita por konservi la sociajn konkerojn, kiujn la Revolucio konvertis en popolajn rajtojn. Ni festos nian sendependecon, nian suverenecon kaj liberecon, li emfazis.

Díaz-Canel diris, ke kiam oni eldiris la frazon "?i tio estas la Revolucio", oni resumas 65 jarojn da heroa kreado kaj oni ?iam pensas unue pri sano kaj edukado.

La  prezidento precizigis, ke la nunaj cirkonstancoj travivataj grandparte estas pro la efikoj de la usona blokado, internaciaj krizoj kaj niaj propraj eraroj.

En alia momento de sia parolado, la ?tatestro konfirmis, ke tiu ?i estas la Revolucio de Fidel kaj Raúl Castro, de la heroa generacio de la centjari?o de la Apostolo (José Martí), kies ideoj da?re gvidas nin kaj estas anka?, li diris, la generacio de ?iuj, kiuj  estas ?i tie por fari la volon de ?i tiu digna kaj ribelema popolo, kiun ni honoras reprezenti.

En siaj vortoj anta? la Parlamento, la prezidento alparolis la  gvidanton de la Revolucio, Raúl Castro, ?eestanta en la salono. Vi multfoje diris al ni, ke ?i eblas kaj ni faros ?in, li konfirmis.

?i tiu estas la Revolucio, tiu de via inda kuba popolo. Nepras la volo labori, la deziro anta?eniri kaj la profunda konvinko, ke ni venkos,  finis la prezidento.

---

[https://www.radiohc.cu/eo/noticias/nacionales/342873-ni-ebligu-niajn-revojn-ec-la-neeblaj-asertis-la-kuba-prezidento](https://www.radiohc.cu/eo/noticias/nacionales/342873-ni-ebligu-niajn-revojn-ec-la-neeblaj-asertis-la-kuba-prezidento)

**Radio Habana Cuba**